

# La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por 1/2 jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por 1/32 de la paĝo.

Ĉio tusaŭta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. c.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie).

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nurnbergo.

No. 4.

Nurnbergo, Aprilo 1891.

Jaro II.

## Ŝanĝotaĵo.

Ni parolos pri kelkaj principoj, je kiuj laŭ nia opinio ni devas nin teni, proponante aŭ enkondukante diversajn ŝanĝojn en nia lingvo. Sed antaŭ ĉio ni permesos al ni malgrandan antaŭparolon. La cirkonstanco, ke ni en nia gazeto komencis paroladi pri ŝanĝoj, timigis kelkajn el niaj amikoj, kiuj ne bone komprenis la esencon kaj la celon de nia agado. La presitaj proponoj elvokis ĉe ili la timon, ke nia lingvo en la nuna stato ne povas sin teni kaj devas esti ŝanĝita! tiu ĉi timo tute nature elvokis alian timon, ke ankaŭ post diversaj ŝanĝoj la lingvo ne taŭgos kaj devos esti eterne ŝanĝata, kaj ĉiu, kiu hodiaŭ lernas la lingvon, ne povas sekve esti certa, ĉu lia uzita laboro ne estos senfrukte perdita kaj ĉu li ne devos denove lernadi kaj relernadi. Tiu ĉi timo estas tute senfundamenta, ĉar la efektiva historio kaj esenco de la proponoj estas sekva: la proponataj reformoj ne estas sekvo de iaj gravaj kontraŭvivaj mankoj en nia lingvo, sed ili estas natura esprimo de la deziro, ke tio, kio estas al ni tre kara, havu formon eble plej perfektan, se la pli granda perfekteco povas esti atingita sen oferoj, sen malutilo kaj sen internaj disputoj. Ni turnas la atenton de niaj legantoj, ke ne la konstruo de nia lingvo elvokis la proponojn de reformoj, kontraŭ kiuj ni nun devus batali (kiel ekzemple en Volapük), sed la proponojn ni mem elvokis, petinte jam en la komenco de nia eliro, ke ĉiu sendu al ni sian opinion kaj proponojn, kiujn li trovas utilajn. La proponoj sekve havas la karakteron ne de postuloj (kiel kelkaj legantoj erare pensas) — ili estas nur bonintencaj konsiloj, por kiuj ni dankas, kvankam la plej grandan parton de la ĝisnunaj ni ne povas uzi. Tial ni volonte aŭskultas kaj priparolas diversajn proponojn en la espero, ke tiu ĉi priparolado kaj analizaĵo eble jetos lumon sur diversajn punktojn kaj poste kun la tempo eble donos al ni utilajn montrerojn, kiuj kun bona rezultato povos esti uzitaj por nia lingvo; sed de priparolo ĝis enkonduko estas ankoraŭ grandega paŝo! Tiel ekzemple eĉ en la plej modela regno naskiĝas kaj volonte estas aŭskultataj diversaj proponoj reformaj, el kiuj multaj baldaŭ perdiĝas kiel netaŭgantaj, sed aliaj iom post iom (sed sen subita rompad!) eniras en vivon; kaj tamen tio ĉi tute ne donas al la legantoj de tiu regno kaŭzon timi, ke ilia regno ne povas sin teni aŭ ke morgaŭ ili devos fordoni, kion ili per laboro atingis hodiaŭ! Nia lingvo, kiel tute sufiĉe montris la praktiko, ne sole tute bone povas sin teni en ĝia nuna stato, sed ni kuraĝas eĉ diri, ke el ĉiuj reformoj proponitaj ĝis hodiaŭ la forte plej granda parto ne sole ne plibonigus la lingvon, sed simple ĝin malbonigus. Tial la

amikoj de nia lingvo povas esti tute trankvilaj. Se ni ne trovos ian certan vojon por enkonduki plibonigojn singarde kaj nerimarkeble, nia lingvo povos tute kuraĝe resti eterne en ĝia nuna formo. Neniu iam devigos niajn amikojn subite forĵeti, kion ili ellernis, kaj lerni novajn formojn. Se kelkaj reformoj efektive estos trovitaj necesaj, ili estos sankciitaj por la komuna uzado kaj akceptos signifon devigan nur iom post iom, nerimarkeble kaj senrompe, sur vojo natura, kiel en ĉiuj aliaj lingvoj. Priparolado kaj pripensado ne estas ankoraŭ tio sama, kio rompad. Parolante pri diversaj reformoj, ni ĉiam komprenas sub tio ĉi nur reformojn privatajn en la privataj verkoj de diversaj aŭtoroj (ankaŭ la reformoj, kiujn ni eble mem faros, devos havi karakteron pure privatan). Por la publiko esperantista tiuj ĉi reformoj ne havas signifon kaj tute ne estas devigaj, kaj ĉiu povas ĉiam sin teni je la unuatempa gramatiko kaj la fundamenta vortaro. Nur kiam montriĝos, ke la ŝanĝitaj formoj jam longe estas uzataj de ĉiuj plej multe legataj aŭtoroj kaj la tuta mondo esperantista per vojo privata kaj malrapida jam nerimarkeble alkiutimiĝis al ili, — nur tiam ili ricevos sankcion kaj komunan devigecon. Sekve neniu devas timi, ke oni faros al li ian konfuzon en tio, kion li lernis, kaj ke oni devigos lin lerni ion novan. Tiun ĉi penson, jam kelkfoje ĉe okazo esprimitan, ni trovis nun necese ripeti ankoraŭ unu fojon, antaŭ ol ni parolas pri la principoj reformaj; ĉar alie de unu flanko parto de niaj amikoj havus senbezzone timon antaŭ la vorto „reformo“ entute, — de la dua flanko la tro varmegaj reformoj faradus al ni ĉiam riproĉojn kaj ne komprenus, kial, priparolante diversajn reformojn, ni ilin tuj ne efektivigas. Kiam estas parolo pri la koro de nia afero, kiun ni devas defendi de mortigaj atencoj, ni pli volas paroli tro multe ol tro malmulte.

Antaŭ ol ni transiras al la analizado de la karaktero de la reformoj konsilindaj, ni metas ankoraŭ unu fojon la gravan demandon: kiu havas la rajton fari reformojn en la lingvo Esperanto? — kaj resumante ĉion, kion ni diris, ni respondas: la rajton fari oficialajn ŝanĝojn en la lingvo Esperanto havas neniu; eble iam poste, kiam nia afero staros jam tute forte, formiĝos kompetenta akademio, kiu havos pli vastajn rajtojn, sed ĝis tiam estas ankoraŭ malproksime. Libroj havantaj la celon instrui pri nia lingvo personojn, kiuj ĝin ankoraŭ ne konas (ekzemple lernolibroj, gramatikoj, vortaroj, stilaj modeloj k. c.) neniam devas deflankiĝi eĉ unu paŝon de la fundamenta komune akceptita formo de la lingvo, esprimita en la unuaj verkoj de nia lingvo, kvankam tiu aŭ alia formo al la aŭtoroj de la diritaj libroj ne plaĉus. Doni novajn formojn en tiaj verkoj instruaj oni povos nur tiam,

se tiuj formoj jam estos delonge akceptitaj kaj uzataj de la plej granda parto de la aŭtoroj, kaj ankaŭ tiam oni devos doni ilin kune kun la formoj malnovaj, aldonante la rimarkon, ke „la fundamenta formo estas tiu kaj tiu (malnova), sed en la literaturo de la lasta tempo la plej ofte estas uzata la formo tiu kaj tiu (nova)“. Tiu ĉi regulo estas tre grava, kaj se la aŭtoroj de lernolibroj sin ne tenados je ĝi severe, ni baldaŭ anstataŭ unu lingvo Esperanto havus multajn, kaj la amikoj de nia lingvo ne komprenus unu la alian. Pro la unueco kaj senkonfuzo, kiuj estas por nia afero tiel gravaj, la libroj instruaj devas esti pedante konservativaj eĉ en la plej malgranda bagatelo!! Sed en verkoj literaturaj, kiuj havas la celon perfektigi kaj riĉigi la lingvon mem kaj helpi al la iom-post-ioma kreado de ĝia formo estonta, en verkoj, kiuj devas servi por homoj, kiuj nian lingvon jam konas, kiujn sekve la novaj formoj ne dekondukas jam de la komuna vojo kaj kiuj scias tre bone diferencigi inter formoj efektive ekzistantaj kaj formoj prove proponataj, — en tiaj verkoj la aŭtoroj laŭ sia bontrovo povas permesi al si diversajn deflankigojn de la komuna stilo kaj eĉ ŝanĝojn gramatikajn. Ĉar la legantoj de tiaj verkoj havas jam propran juĝon, tial la proponataj reformoj estos ne blinde, sed konscie akceptataj kaj uzataj de la aliaj verkantoj en Esperanto, aŭ malakceptataj kaj de neniuj imitataj, kaj sekve tiuj ĉi reformoj aŭ iom post iom perfektigos nian lingvon, aŭ ili perdiĝos tuj post sia naskiĝo. Kaj per tia maniero nia lingvo sen videblaj ŝanceliĝoj pace irados sian vojon kaj perfektigados sen la plej malgranda malordo kaj sen la plej malgranda maloportuneco por la lernantoj, kiel ĉiu alia lingvo, kiu ankaŭ ĉiam perfektigas, kvankam tute nerimarkeble por ĝiaj uzantoj kaj sen iaj arbitraj ordonoj aŭ disputoj.

Nun ni metas la duan demandon: en kia mezuro la ŝanĝoj devas esti farataj? Respondante tiun ĉi demandon, ni devas antaŭ ĉio memori, ke la celo de nia laborado estas ne krei ian lingvan ludilon, kiu kontentigus ĉiujn (!) gustojn, sed — enkonduki lingvon tutmondan. Poste, kiam nia celo estos atingita kaj pri la tutmondeco de la lingvo ni jam ne bezonos zorgi, tiam sur la unuan planon eliros la formo kaj la detaloj de la lingvo; sed nun ĉiu devas antaŭ ĉio memori pri nia celo plej grava kaj plej malfacile atingebla. Se la reformistoj bone kaj longe pripensus kaj elprovus siajn reformojn, ili baldaŭ vidus, ke la plej granda parto de tio, kio al ili persone plaĉas, neniam plaĉus al aliaj personoj kaj tute ne bonigus la lingvon; sed se ni eĉ supozus, ke ĉiuj reformoj estas absolute bonaj, ni ne devas forgesi, ke pli bone estas havi unu lingvon, se eĉ ne tute ideale perfektan (se ĝi nur povas sin teni en sia formo kaj se la fundamento estas bona), ol havi grandegan amason da lingvoj malegalaj laŭ la personaj plaĉoj de ĉiu aparte (ĉar tiam nia sola celo — havi unu aŭ du lingvojn por ĉiuj nacioj — estus ja tute perdita kaj nia tuta laborado ne havus sencon). Ĉiu konanta nian lingvon konsentas, ke en okazo de bezono ĝi povus eterne sin tre bone teni plene en ĝia nuna formo; dum ĉia reformo, ĉu ĝi montriĝos utila aŭ ne, — unu flankon malbonan ĝi jam havas, ke ĝi batalas kontraŭ la celo, kiu nun estas por ni la plej grava. Jam tiu ĉi cirkonstanco mem devas montri al ni, ke ni nun devas esti ŝparemaj kun reformoj kaj ĉion, kio ne estas efektive necesa, lasi por la tempo estonta. Se ni al tio ĉi ankoraŭ memoros, ke nia nuna literaturo estas ankoraŭ tre malriĉa kaj ĉiu nova verko por la plej granda parto de niaj amikoj servas ankoraŭ kiel rimedo por perfektigadi en nia lingvo kaj apartenas sekve al la kategorio de libroj instruaj, pri kiuj ni supre parolis, — tiam neniuj dubos, ke la demando, kiun ni metis, devas esti respondita jene: ŝanĝoj en nia lingvo en la nuna tempo devas esti farataj ankoraŭ en la plej malgranda mezuro kaj nur en okazoj tre gravaj. Antaŭ ol iu aŭtoro decidiĝos fari en sia

privata verko ian eĉ la plej malgrandan kaj la plej mature pripensitan kaj elprovan deflankigon de la komuna stilo, li devas ĉiam serioze sin demandi, ĉu la graveco de lia reformo kovras la supre montritan malutilon de lia paŝo kaj la malbonan ekzemplon, kiun li donos al reformistoj nepripensemaj. Eĉ la efektive bonaj reformoj devas memori pri la tempo kaj maniero de enkonduko; ĉar multa, kio poste estos eble utila, nun facile povus alporti malutilon, kaj preskaŭ ĉio, kio enkondukite ŝtupe estus utila, enkondukite tro subite povus malbonigi nian aferon. Ĉar ni mem la plej multe laboris super nia lingvo kaj la plej bone konas ĝian spiriton kaj dank' al nia plej multa laborado en nia afero ni la plej bone scias, kio por ĝi estas akceptebla kaj kio estas danĝera, tial estus la plej bone, se niaj amikoj ĉiam modeligadus sian stilon laŭ la stilo de „La Esperantisto“, kiu estos regulatoro kaj ankaŭ enkondukados iom post iom reformojn, sed ŝtupe kaj malrapide — vojo tre longa kaj por multaj eble enuiga, sed certa. Nia konsilo estas eble nedomesteco de nia flanko, sed pro la bono de nia afero ni devis ĝin malkaŝe diri. Ĝi estas nia konsilo, kiun niaj amikoj laŭ sia propra juĝo povas akcepti aŭ ne akcepti.

Nun ni transiros al la analizo, kia speco de reformoj enkomune estas bona (nun aŭ poste) kaj kia enkomune estas nebona kaj evitebla ne sole nun, sed eble ankaŭ ĉiam. Mezurilo por ni estos la principo, ke ĉiu reformo nur tiam estas bona, se la utilo, kiun ĝi alportas, kovras la malutilon, kiun ĝi kiel reformo enhavas jam en si mem. Analizinte diversajn ekzemplojn de reformaj proponoj, faritaj ĝis hodiaŭ aŭ per artikoloj aŭ per privataj leteroj, ni eliros el ili la komunan konkludon, kia kategorio de reformoj estas aprobata, kaj poste ni montros, per kia maniero la aprobataj reformoj la plej bone povas esti enkondukitaj sen malunueco kaj malordo. Ni komencos de ekzemploj, kiujn ni persone ne aprobas, kaj finos per tiuj, kiujn ni trovas bonaj.

(Daŭrigo venos.)

## Korespondoj.

Str. Johannesgatan 11, Upsala (Svedujo), la 23/II. 1891.

Tre estimata Sinjoro!

Mi havas la honoron sciigi Vin, ke tio ĉi hieraŭ fondiĝis klubo Esperanta sub la nomo „Klubo Esperantista Upsala“. La nomoj de la unuaj klubanoj estas: Tham, E., fil. kand., Klostergatan 14; Langlet, W., fil. stud., Sysslomansgat. 3; Björkmann, V., fil. stud., Svartmangat. 8; Oestlund, J. L., s. m. kand., Drottninggat. 1; Fredbärj, J., fil. stud., Drottninggat. 1; Smedberg, J. L., fil. stud., Jernbrogat. 10; Wedblad, J., stud. Vretgränd 19; Valde, V., teol. kand., N. Skolgat. 7; Norrby, J., teol. kand., Johannesgat. 11 kaj Via humila

S. A. Lundström,  
klubestro.

St. Sulpice, Tarn, Francujo, 29/I 1891.

Tre estimata Sinjoro!

Fine liberigita de la malhelpaĵoj, kiujn alportis al mi senĉese longa suferado kaj tre malfacila situacio, mi sciigas Vin kun granda ĝojo, ke mi komencas de nun energian laboradon por Via mirinda verko.

Mi ekzamenis la lingvon ĉiufanke, kaj ju pli mi konsideras ĝian konstruon de reguloj kaj vortoj, des pli mi admiras la profundan logikon, kiu Vin inspiris kaj kondukis ĉiam rekte en vojo tiel malfermita por multegaj eraroj. Kiom da bariloj Vi devis detru, kiom da malfacilaĵoj Vi devis venki — tion plene komprenas nur tiuj, kiuj laboradis, kiel mi, en la daŭro de ses jaroj super sistemo simila.



Ricevinte de mi neniam sciigojn en la daŭro de tiuj ĉi lastaj monatoj, eble Vi pensis, ke mia bela fervoro de la unua tago tute forflugis. Ne, sinjoro: oni ne forgesas tiel facile la karesatan revon de sia vivo. Sed kion povis fari homo ĉiam aŭ mem malsana aŭ malsanulo fleganta, kiel mi estis de 1889 ĝis hodiaŭ? Nun mi havas almenaŭ ĉiutage kelkajn liberajn minutojn kaj ne estas de mateno ĝis vespero apud la lito de malsanulo. Post kelka tempo mi skribos al Vi kaj elvolvos mian planon de batalado kontraŭ la sovaĝa indiferenteco de miaj kunpatrujanoj. Ha, se ni havus kapitalojn! Hodiaŭ mi volas nur sciigi Vin, ke mi fariĝis fine unu el la batalantoj por la venko de nia sankta ideo. Mia nuna adreso estas: L. de Beaufront, instruisto, ĉe la grafo de Lavallière, en St. Sulpice, Tarn. Kun miaj sinceraj deziroj por Via perfekta feliĉo, mi Vin petas, tre estimata sinjoro, akcepti la plej koregan saluton.

19/II.

Kara Sinjoro! Multaj el la plej seriozaj personoj, kiuj povus helpi nian aferon en alta grado, eĉ ne tralegas la broŝureton aŭ vortareton al ili senditan. Vidinte nur la titolon, unuj ridetas de kompato je nia frenezo, aliaj ĵetas la libreton en ian angulon kaj diras: jes, mi ĝin legos kiam mi ne scios kion fari. Kaj bedaŭrinde la verketo longe, se ne eterne, dormos en sia angulo. Estas ja necese, ke ni devigu tiajn personojn vidi kaj ekkoni nian lingvon vole-ne-vole. Tial, anstataŭ sendi al ili tuj la broŝureton aŭ vortareton, mi komencas per tio, ke mi ilin antaŭsciigas pri tiu ĉi sendo. Por tio mi skribas al ili leteron en Esperanto, submetante sub ĉiu linio la tradukon kaj uzante vortojn la plej direkte kompreneblajn. Tiel mia leganto jam surprizita per la adreso, skribita en Esperanto, ne povas nei la simplecon kaj facilecon de nia kara lingvo; ĉar mi komencas antaŭ ĉio per surskribado sur la koverto: Al sinjoro... doktoro, profesoro, ĉefa redaktoro k. e... en...“ por montri, ke eĉ la adresojn ni povas la plej ofte redakcii en Esperanto.

Kiel persono bela, agrabla kaj aminda, nia lingvo estas preskaŭ ĉiam amata de ĉiuj, kiujn nia lerteco povas nur igi ĝin atente rigardi. Por atingi pli facile tiun ĉi celon, mi ne forgesas montri al mia adresito precipe la ecojn kaj indojn, per kiuj nia lingvo kontentigas la bezonojn specialajn de lia profesio.

Mi frapas sen honto je ĉiu pordo, tiom pli kuraĝe, ke, ĉar la verko ne estas mia, mi povas paroli pri ĝi sen ia deteno. Cetere kial mi hontus bataladi por la venko de unu progreso, sen ĵiuj ĉiuj aliaj restus ne plenaj. Dissendante ĉien kiom eble pli da vortaretoj kaj broŝuretoj, mi skribas al la redaktoroj de niaj gazetoj, por ke ili parolu pri nia afero. Mi skribos ankaŭ al niaj grandaj eldonistoj kaj al la plej estimataj niaj verkantoj. Kun miaj leteroj mi sendos al tiuj ĉi lastaj peceton esperante tradukitan el iliaj plej gloraj verkoj. Mi ne forgesos ankaŭ la diversajn kondukantojn kaj profesorojn de niaj lernejoj por junuloj. Fine mi skribos al kelkaj personoj riĉaj, kiuj sin interesas je la aferoj de la spirito.

En mia korespondado kun amikoj mi uzas plene aŭ parte nian lingvon, por devigi ilin ellerni ĝin senlabore kaj igi ilin enskribi sian nomon en la nomaron. Cetere mi uzas kaj uzos mian tutan liberan tempon por la vastigado de nia lingvo. Baldaŭ Vi vidos, ke nia sankta afero ne havas en mi partianon maldiligentan aŭ dormantan. Nun mia plej grava laboro estas la traduko de la Poŝa Lernolibro.

28/II.

Plene kaj korege mi konsentas je Via propono (presi kelkajn el miaj leteroj); estas utile vekti la dormantajn kaj kuraĝigi la bonajn kunbatalantojn.

Certe ni havas antaŭ ni barilojn, konstruitajn de la homa malsaĝeco kaj apatio; sed fine „dissaltos la obstinaj baroj per nia konvinko kaj senhaltala laborado disbatitaj“. Sendube ni ne vidos la plenan frukton de nia pacienco; sed kion ĝi malhelpas? Ĉu la homaro tuj alprenis iam ian progreson eĉ la plej malgrandan sen kontraŭbatalado? Kiam la batalintoj estas mortintaj, tiam la freneza mondo konscias iliajn bonfarojn kaj bedaŭras la dolorojn, per kiuj ĝi pagis ilian fidelan amon.

Mi sendas al Vi la artikolon, kiun mi promesis en mia lasta letero; ĝi estas la unua sed ne restos la lasta.

Tute Via

L. de Beaufront.

## Novajoj.

Por la celoj de nia afero L. Zamenhof ricevis: de A. Dombrovski el Ustjuĝna 1 rublon; de s-rino E. Manjkovskaja el Kremeneĉ — 2 rublojn; per la kolekto de s-ro I. Puĉkovski el Kjaĥta: de s-ro I. Puĉkovski 1 r. 25 kop., de s-ro Poljakov 1 r., 25 kop., de s-ro Milĉevski 1 r. 30 kop., de s-ro Savicki 75 kop., de s-rino Ĉerepanov 1 r. 25 kop., de s-ro Ŝiŝmarev 20 kop. Kune 9 rubloj. Kune kun la antaŭe ricevita ĝi faras 39 rublojn 8 kopekojn.

Nomaro de la personoj kiuj aparte aŭ inter aliaj verkoj venigis en la lasta monato lernolibrojn (ne malpli ol 10) aŭ vortaretojn (ne malpli ol 100): s-ro de Beaufront el St. Sulpice — 150 vort. (<sup>150</sup>/<sub>8</sub>); s-ro G. Rjabinin el Zmiev — 25 lern. (<sup>25</sup>/<sub>41</sub>); s-ro A. Rjeznov el Samara — 10 lern. (<sup>10</sup>/<sub>41</sub>); s-ro C. Hüberr el Aleksandrovsĉ — 25 lern. (<sup>25</sup>/<sub>41</sub>); s-ro M. Popov el Balakovo — 25 lern. (<sup>25</sup>/<sub>41</sub>); s-rino E. Manjkovskaja el Kremeneĉ — 10 lern. (<sup>10</sup>/<sub>41</sub>).

En la lasta monato la sekvantaj gazetoj parolis pri nia afero: „Illustrierte Zeitung“ (Leipzig) No. 2486 (pri la fondiĝo de la klubo Munĥena); „Messager de Toulouse“ No. 19,578 (artikolo pri nia lingvo); „Der Stereotypeur“ No. 3 (artikolo pri nia lingvo kun la gramatiko de nia lingvo kaj kun paragrafo da ekzercoj). Al sinjoroj Meier, Beaufront kaj Schmidt, kiuj alsendis al ni la diritajn gazetojn ni esprimas nian koran dankon.

Eliris lernolibro de nia lingvo en la lingvo litova (litauisch), eldonita de la pastro A. Dombrovski el Ustjuĝna (Lingvo internacia de d-ro Esperanto, eldono litova. — Mokintuve terptautiszkos kalbos D-ro Esperanto, iszdave K. A. Dabrauskas. Tilzito. Presejo de J. Schoenke). La libreto estas eldonita tre bone kaj havas ankaŭ oportunan formon (poŝan) kaj bonan eksteron. La 1a parto enhavas antaŭparolon, la gramatikon, tradukon de la „Patro nia“ kaj de la unua peco el la Biblio, proverbojn, kelkajn ekzemplojn de leteroj, 2 litovajn popolajn kantojn, la versaĵon „Al la fratoj“ (el la „Esperantisto“ 1890) kaj la tradukon de unu versaĵo de la rusa poeto Nadson; la 2a parto enhavas vortaron esperanto-litovan kaj litova-esperantan.

Ni ricevis la sekvantajn 2 verkojn (pri kiuj en la pasinta numero estis dirite uur en la parto de anoncoj, ĉar la verkojn mem ni ankoraŭ ne havis):

1) „La Lingvo Internacia Esperanto. Vollständige methodische Grammatik, Formenlehre und Syntax der internationalen Sprache Esperanto, von Ludwig Meier, k. b. Hauptmann a. D., geprüfter Lehrer der modernen Sprachen, Vorstand der Societo Esperantistoj München. München 1891. Im Selbstverlage des Verfassers. Augustenstrasse 89/III.“ La libro, elegante eldonita, diferencas de la ĝisnunaj lerno-

libroj per tio, ke ĝi ne enhavas apartan vortaron, sed la tuta libro sin okupas je detala kaj sistema klarigado de la gramatiko de nia lingvo. Por ĉiuj reguloj de la gramatiko estas ankaŭ donitaj diversaj ekzercoj, kaj sub ĉiu paragrafo estas donita la traduko de la vortoj, kiuj sin trovas en tiu paragrafo. La kosto de la libro estas 60 kopekoj = 1 marko 20 pfenigoj (ne 60 pfenigoj, kiel erare estis presita en la lasta numero). Ni deziras al la libro la plej bonan sukceson.

2) Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch-internationaler Theil. Meza vortaro germana-inter-nacia. Nürnberg 1891. Druck und Verlag von W. Tümmel's Buch- und Kunstdruckerei. Tiu ĉi verko, eldonita de sinjoroj W. H. Trompeter kaj Chr. Schmidt, prezentas la plenigon al la Meza vortaro internacia-germana (Nr. 21) kaj estas eldonita en tiu ĉi sama formato kiel la lasta verko, tiel ke la du partoj povas esti kune binditaj. La verkoj povas doni al niaj germanaj amikoj preskaŭ tian saman servon, kiel la Plena vortaro al niaj amikoj rusaj. La bezono de tia verko estas jam longe sentata kaj ni ĝoje salutas ĝian aperon.

Eliris la promesita en No. 1 nova libro de sinjoro A. Grabowski: Du rakontoj en la lingvo internacia Esperanto. Nova Jaro de Boleslav Prus. — Janko Muzikanto de H. Sienkiewicz. La stilo de sinjoro Grabowski estas tro bone konata de ĉiuj niaj legantoj, por ke lia libro bezonu ian rekomendon. La elekto de la rakontoj estas farita tre bone; la libreto estas tre dezirita akiro por nia literaturo, kaj ni ne dubas, ke la nova verko de la aŭtoro de la „Kondukanto“ trovos multajn amikojn.

Kelkaj amikoj miras, ke diversajn faktojn, kiujn ili donis por nia rubriko „Navaĵoj“ (kiel ekzemple sciigoj, korespondoj, alsendo de gazetoj, monaj oferoj k. c.), ili „ne trovas“, en nia gazeto, kaj ili pensas, ke ni forgesis tion ĉi presi. Tial ni devas sciigi, ke ni ĉion tion ĉi ne forgesas, kaj se la amikoj tion aŭ alian ne trovas en la plej proksima numero, ili volu pacience atendi ĝis la venonta numero; ĉar dank' al la apartaj kondiĉoj, en kiuj nia gazeto estas presata, kaj dank' al la longa vojo, kiun la materialo de ĉiu numro devas trairi, antaŭ ol ĝi venas en formo de preta numero al la manoj de la abonantoj (aparte en Rusujo), en ĉiu numero povas esti presita nur tio, kio estis alsendita al ni ne pli malfrue ol 6 semajnojn antaŭ ol la dirita numero venas prete al la abonantoj. De nia flanko ni faras ĉion por rapidigi la iradon de la afero, sed ne ĉio dependas de ni. — Pro tiu sama kaŭzo ni ne povas ankoraŭ doni en tiu ĉi numero inter alia ankaŭ la adresojn de diversaj personoj, kiuj deziras korespondadi inter si, kvankam ni tiujn ĉi adresojn ricevis de diversaj flankoj tuj post la dissendo de la No. 3 de nia gazeto. Ni donos tiujn ĉi adresojn en la venonta numero.

## La batalo de l' vivo.

Rakonto de Charles Dickens.

(Daŭrigo.)

„La franco“, diris sinjoro Snitchey kaj rigardis en la bluan paperujon, „estis ne prava, doktoro Jeddler; kaj Via filozofio estas ankaŭ tute malprava, Vi povas al mi kredi, kaj mi tion ĉi jam ofte diradis. Vi diras, ke ekzistas nenia seriozaĵo en la vivo! Kiel Vi nomas proceson?“

„Serco“, respondis la doktoro.

„Ĉu Vi havis iam proceson?“ demandis sinjoro Snitchey levante la rigardon de la blua paperujo.

„Neniam“, respondis la doktoro.

„Se Vi iam venos al proceso“, diris sinjoro Snitchey. „Vi eble lernos alie pensi“.

Craggs, kiu ŝajne estis reprezentata de Snitchey kaj sian apartan ekzistadon kaj sian „mi“ nur malmulte aŭ tute ne konsciadis, esprimis nun propran rimarkon. Ĝi rilatis je la sola penso, kiun li posedis ne en egala duono kun Snitchey; por tio kelkaj aliaj prudentaj kaj spertaj homoj ĝin dividadis kun li.

„La procesoj estas farataj tro facilaj al la homoj“, diris Craggs.

„La procesoj?“ demandis la doktoro.

„Jes“, diris sinjoro Craggs, „kiel ankaŭ ĉio alia. Ĉio en la mondo hodiaŭ ekzistas nur por esti farata tro facila. Tio ĉi estas la malfortaĵo de nia tempo. Se la mondo estas farso (mi ne estas preta tion ĉi nei), ĝi devus esti farso tre malfacila. La vivo devus esti kiel eble pli streĉa batalo, sinjoro. Tio ĉi estas ĝia celo. Sed nun ĝi estas farata tro facila. Ni oleas la hokojn de la pordoj de l' vivo. Ili devus esti rustaj. Baldaŭ ili kutimos sin malfermadi tute mallaŭte. Kaj tamen ili devus krakadi en la hokoj, sinjoro“.

Sinjoro Craggs ŝajne mem krakis sur siaj hokoj, kiam li prezentis sian opinion, kies impreson li per sia eksteraja multe plifortigis, ĉar li estis malvarma, seka, severa homo, en grizaĵo kaj blankaĵo kiel siliko, kaj havis malgrandajn fajre-rantajn okulojn, kiel se oni elbatadus el ili fajron. Ĉiuj tri regnoj de l' naturo havis propre reprezentanton en tiuj ĉi tri viroj; ĉar Snitchey estis simila je pigo aŭ korvo (nur li ne estis tiel glata kaj brilanta), kaj la doktoro havis striitan vizagon, kiel citrona pomo, kaj sur tiu ĉi en kelkaj lokoj kavetojn, kie kvazaŭ la birdoj estis bekintaj, kaj poste malgrandan harligeton, kiu prezentis la tenilon.

Kiam en la pordo de l' ĝardeno aperis la sana figuro de bela junulo en kostumo de vojaĝo kaj akompanata de homo, kiu portis lian pakajojn, per rapidaj paŝoj kaj kun vizaĝo plena je gajeco kaj espero tute konvene al la bela mateno, la tri viroj iris al li renkonte, kiel la fratoj de la tri Parkoj, aŭ kiel la tre efekte maskitaj Gracioj, aŭ kiel la grizaj profetoj sur la dezertaĵo, kaj ĉiuj tri lin salutis.

„Ankoraŭ multajn feliĉajn tagojn Alf“, diris la doktoro.

„Tiu ĉi feliĉa tago revenadu cent fojojn, sinjoro Heathfield“, diris sinjoro Snitchey kun profunda saluto.

„Ĝi multajn fojojn revenadu!“ ripetis Craggs per profunda saluto.

„Kia pafaro!“ ekkriis Alfred kaj haltis, „kaj unu — du — tri — sole sciigistoj de nenio bona sur la granda maro de l' vivo. Mi ĝojas, ke Vi ne estas la unuaj, kiujn mi vidas hodiaŭ matene: mi prenis ĝin por malbona antaŭsigno. Sed Grace estis la unua — mia kara, bona Grace — tial mi eltenos kontraŭ Vi ĉiuj!“

„Permesu, sinjoro, mi estis la unua“, diris Clemency Newcome. „Vi scias, ŝi promenadis tie ĉi en la ĝardeno de la komenco de l' mateno. Mi estis interne en la domo.“

„Estas vere! Clemency estis la unua“, diris Alfred.

„Tiel mi kontraŭmetos al Vi Clemency'on.“

„Ha, ha, ha! — por ni kaj Craggs“, diris Snitchey.

„Kia kontraŭmeto!“

„Ŝi eble ne estas tiel malbona, kiel ĝi elrigardas“, diris Alfred kaj skuis al la doktoro kore la manon, poste ankaŭ al Snitchey kaj Craggs, kaj rigardis ĉirkaŭen. „Kie estas la — mia Dio!“

Kun rapida movo, kiu por momento metis Jonathan'on Snitchey kaj Thomas'on Craggs en pli proksiman kuntuŝigon, ol kiel ili decidis en sia negocita kontrakto, li ĵetis sin tuj, kie staris la ambaŭ fratinoj, kaj — sed mi ja ne bezonas rakonti, kiel li salutis antaŭe Marion'on kaj poste Grace'on, kaj mi faras nur la rimarkon, ke sinjoro Craggs eble trovis, ke li faras ĝin al si tro facila.



Eble por deturni la atenton, doktoro Jeddler rapidis aliri al la tablo de matenmanĝo, kaj ĉiuj sidigis al la manĝado. Grace prenis la rolon de prezidanto, sed ŝi sciis sin tiel loki, ke ŝi apartigis sian fratinojn kaj Alfred'on de la resto de la societo. Snitchey kaj Craggs sidis unu kontraŭ la dua, havante inter si la bluan paperujon pro sendangereco; sed la doktoro havis sian ordinaran lokon kontraŭ Grace. Clemency saltadis ĉirkaŭ la tablo kiel disportantino, kaj la melankolia Britain plenumadis apud malgranda flanko tablo la oficon de distranĉisto.

„Viandon?“ diris Britain, proksimiĝante al sinjoro Snitchey kun distranĉilo kaj forko en la mano kaj ĵetante al li la demandon kiel ŝtonon sur la kapon.

„Jes“, respondis la advokato.

„Kaj Vi volas viandon?“ diris Britain al Craggs.

„Malgrasan kaj brunan“, respondis tiuj ĉi. Kontentiginte la dezirojn de tiu ĉi ambaŭ kaj modere provizinte la doktoron (li ŝajne sciis, ke la ceteraj ne deziras manĝon), li restis apud la du advokatoj tiel proksime, kiel nur la konveno permesis, kaj observadis ilin per senmovaj okuloj. Nur unu fojon lia malafabla vizaĝo iom glatiĝis, tio ĉi estis kiam sinjoro Craggs, kies dentoj estis ne el la plej bonaj, faris malbonan gluton kaj estis atakita de konvulsia tusado; kun granda viveco Britain tiam ekkriis: „mi pensis, ke li sufokiĝos!“

„Nun, Alfred“, diris la doktoro, „kelkajn vortojn pri aferoj negocaj, dum ni estas ankoraŭ ĉe la matenmanĝo“.

„Dum ni estas ankoraŭ ĉe la matenmanĝo“, diris Snitchey kaj Craggs, kiuj ŝajne tute ne pensis ankoraŭ pri ĉesado.

Kvankam Alfred ne matenmanĝis kaj videble havis multe por fari, li tamen respektis respondis:

„Kiel Vi ordonos, sinjoro!“

„Se povus esti io serioza“, komencis la doktoro, „en tiu ĉi—“

„Farso, sinjoro“, plenigis Alfred.

„En tiu ĉi farso“, daŭrigis la doktoro, „ĝi estus tiu ĉi kuntrafiĝo de la tago de l' adiaŭdiro kun duobla tago de naskiĝo, al kiu por ni kvar estas ligitaj multaj agrablaj rememoroj kaj kiu ĉiam revokados al ni en la memoron nian longan kaj amikan kunevivadon. Sed tio ne apartenas tien ĉi.“

„Ho jes, doktoro Jeddler“, diris la junulo. „Ĝi bone apartenas tien ĉi, tion diras al mi mia koro tiun ĉi matenon, kaj ankaŭ la Via tion al Vi dirus, se Vi volus ĝin aŭskulti. Mi forlasas hodiaŭ Vian domon; mi ĉesas hodiaŭ esti Via zorgato; ni disiĝas kiel duonaj parencoj, kiuj disligas unu ligilon, dum aliaj jam ridetas al ni en la estonteco, —“ li rigardis ĉe tiuj ĉi vortoj Marion'on, kiu sidis apud li — „ligiloj tiel riĉaj je esperoj, ke vortoj ne povas tion ĉi esprimi. Vi vidas“, li aldonis gaje, „Vi vidas, doktoro, estas ankoraŭ greno da seriozaĵo en tiu ĉi granda malsaĝa amaso da polvo. Hodiaŭ almenaŭ ni konfesu, ke ekzistas ankoraŭ greneto da seriozaĵo“.

„Hodiaŭ!“ ekkriis la doktoro. „Aŭskultu, aŭskultu! ha, ha, ha! Hodiaŭ pli ol en ĉiuj tagoj en la malsaĝa jaro. Hodiaŭ, kiam tie ĉi havis lokon la granda batalo? Sur tiu ĉi loko, kie ni nun sidas, kie mi hodiaŭ matene vidis danci miajn knabinojn, kie la fruktoj por nia matenmanĝo ĵus estas deŝiritaj de tiuj ĉi arboj, kiuj havas siajn radikojn ne en tero, sed en homoj, tie ĉi tiom multaj trovis la morton, ke ankoraŭ en mia juneco, post multaj generacioj, tie ĉi estis elfosita tuta mortintaro da ostajoj kaj da pecoj de fenditaj kranioj. Kaj tamen eĉ cent homoj en tiu batalo ne sciis, por kio kaj kial ili batalis; eĉ cent el tiuj, kiuj triumfis la venkon, ne sciis, kial ili tion ĉi faris! Eĉ kvindek homoj ne fariĝis pli feliĉaj per la gajno kaj perdo. Eĉ ses homoj ne havas hodiaŭ konsentan opinion pri la kaŭzo kaj rezultato: per unu vorto, neniu, ekster la plorantaj pro la mortigitaj, sciis iam ion difinitan pri tio ĉi. Seriozaĵo!“ diris la doktoro ridante. „Tia mondo!“

„Sed al mi ĉio tio ĉi ŝajnas tre serioza“, diris Alfred. „Serioza!“ ekkriis la doktoro. „Se Vi tiajn aferojn akceptas kiel seriozaj, Vi devas freneziĝi, aŭ iri sur altan monton kaj fariĝi ermito.“

„Kaj al tio ĉi estas jam tiel longe de tiu tempo“, diris Alfred.

„Longe!“ rediris la doktoro. „Ĉu Vi scias, kion la mondo faradis de tiu tempo ĝis hodiaŭ? Mi ĝin ne scias!“

„Ĝi iom procesadis“, rimarkis sinjoro Snitchey kaj miksis sian teon.

„Kvankam oni ĝin faradis al la homoj ĉiam tro facila“, diris lia kompaniano.

„Kaj Vi permesos al mi diri, doktoro“, daŭrigis sinjoro Snitchey, „kvankam mi jam mil fojojn esprimis mian opinion, ke en la mondo, se ĝi procesas, kaj entute en la sistemo de ĝia juĝofarado mi vidas ion efektive seriozan, ion realan, ion, kio havas sian intencon kaj sian celon —“

Clemency Newcome puŝigis nun je la tablo, ke ĉiuj teleroj kaj tasoj ekkrakis.

„Nu, kio estas?“ ekkriis la doktoro.

„La malbenita paperujo“, diris Clemency, „kiu ĉiam venas inter la piedoj!“

„Kio havas sian intencon kaj sian celon, mi diris,“ komencis denove Snitchey, „kio postulas de ni estimon. La vivo estas farso, Vi diras, doktoro Jeddler? la vivo kun la juĝofarado?“

La doktoro ridis kaj rigardis Alfred'on.

„Ni supozu, ke la milito estas malsaĝaĵo“, diris Snitchey.

„En tio ĉi ni konsentas. Ekzemple tie ĉi ni vidas ĉarmegan lokon —“ li montris per la forko en la ĉirkaŭaĵon — „kiu antaŭ longa tempo estis kovrita de amasoj da soldatoj — ĉiu aparte kulpa je rompo de la paco de l' lando — kaj dezertigita per fajro kaj glavo. Ha, ha, ha! La sola penso, ke homo memvole elmetas sin al morto per fajro kaj glavo! Tio ĉi estas malsaĝe, tute ridinde! oni devas levi la ŝultrojn pro la homoj, kiam oni pensas pri tio ĉi! Sed ni prenu tiun ĉi ĉarman lokon kiel ĝi estas nun. Ni prezentu al ni la legajn rilatojn, kiuj naskiĝas de la tera propraĵo; la heredigadon kaj donacadon de la tera propraĵo, la prodonadon kaj reelaĉetadon de la propraĵo; farmadon liberan, farmadon heredan, farmadon tempan; ni prezentu al ni“, diris sinjoro Snitchey kun tia entuziasmo, ke li ŝmacis per la lipoj, „ni prezentu al ni la komplikitajn leĝojn, kiuj rilatas je la rajto de posedado kaj la pruvado de tiu ĉi rajto, kun ĉiuj reciproke kontraŭparolaj precedencoj kaj aktoj parlamentaj apartenantaj al tio ĉi; la nekalkuleblan multon da komplikitaj kaj senfinaj kancelariaj juĝaj procesoj, al kiuj tiu ĉi bela loko donas la kaŭzon: — kaj konfesu, doktoro Jeddler, ke tio ĉi estas unu oazo en la mondo! Mi esperas“, diris sinjoro Snitchey kun rigardo sur sian kompanianon, „ke mi parolas en la nomo de la firma, sinjoro Craggs?“

Ĉar sinjoro Craggs jesis, sinjoro Snitchey, kies apetiton la parolado akriĝis, rimarkis, ke li estas preta akcepti ankoraŭ unu pecon da viando kaj tason da teo.

„Mi ne volas defendi la vivon entute“, li aldonis kaj frotis al si interne ridante la manojn; „ĝi estas plena je malsaĝaĵoj, plena je ankoraŭ pli malbonaj aferoj. Certigoj de fideleco, de konfido, de neprofitemeco kaj similaj. Ba, ba! ni vidas, kian indon ili havas. Sed Vi ne devas ridi je la vivo; Vi bezonas ludi partion, tre malfacilan partion! Ĉiuj homoj ludas kontraŭ Vi, kaj Vi ludas kontraŭ ĉiuj homoj. Ho, ĝi estas tre interesa afero. Ĝi estas tre rafinitaj iroj sur la ŝaka tabulo. Ridi Vi devas, doktoro Jeddler, nur tiam, se Vi gajnas; kaj ankaŭ tiam ne tro multe. Ha, ha, ha! ne tro multe“, ripetis Snitchey, balancante la kapon kaj fermetante unu okulon, kiel se li volus aldoni: „sed tion ĉi Vi povas fari!“

„Nu, Alfred“, ekkriis la doktoro, „kion Vi diros al tio ĉi?“

„Mi diros nur“, respondis Alfred, „ke la plej granda komplezo, kiun Vi povus fari al mi kaj, mi pensas, ankaŭ al Vi mem, estus, se Vi iam provus meti en forgeson tiun ĉi kampon de l' batalo kaj aliajn similajn por la pli granda kampo de l' batalo de l' vivo, sur kiun la suno lumas ĉiun tagon.“

„Nu, mi timas, ke tio ĉi ne farus lin pli kvieta, sinjoro Alfred“, diris Snitchey. „La batalantoj en tiu ĉi batalo de l' vivo estas tre varmegaj kaj malamegaj unu kontraŭ la alia. Tre malagraba estas la hakado kaj pikado kaj la sekreta mortigado de post la dorso kaj la dispredado kaj sufokado; per unu vorto ĝi estas propre malbona historio.“

„Mi pensas, sinjoro Snitchey“, diris Alfred, „ke en tiu ĉi batalo estas renkontataj mallaŭtaj venkoj kaj bataloj, granda memferemeco kaj noblaj faroj plenaj je heroeco — eĉ en ĝiaj ŝajnaj bagateloj kaj kontraŭparoloj —, faroj, kiuj tute ne estas malpli malfacile plenumebaj tial, ke ili estas enskribitaj en nenia tera kroniko, ke nenia tera publiko ilin vidas; faroj, kiuj ĉiutage havas lokon en kaŝitaj anguloj, en malriĉaj dometoj kaj en viraj kaj virinaj koroj, — faroj, el kiuj unu sola povus la plej severan mallaŭdanton paciĝi kun tiu ĉi mondo kaj instrui lin konfidi al ĝi kaj esperi, se eĉ duono de ĝiaj loĝantoj sin trovas en milito kaj kvarono en procesado; kaj tio ĉi jam multe signifas.“

La ambaŭ fratinoj aŭskultis kun streĉita atento.

„Bone, bone!“ diris la doktoro, „mi estas tro maljuna por esti ankoraŭ konvertita, eĉ de mia amiko Snitchey tie ĉi, aŭ de mia bona fratino Martha Jeddler, kiu ankaŭ havis siajn spertojn, kiel ŝi diras, kaj de tiu tempo fariĝis bonfarema kaj malsevera kontraŭ ĉiuj specoj de homoj, kaj kiu tiel forte sin tenas je sia opinio (nur kiel virino ŝi estas malpli prudenta kaj pli obstina), ke ni ne povas vivi en konsento kaj malofte nin vidas. Mi estas naskita sur tiu ĉi kampo de l' batalo. Sesdek jaroj pasis super mia kapo, kaj mi ĉiam vidadis, ke la tuta kristanaro, kun la Dio scias kiom da amantaj patrinoj kaj sufiĉe bonaj filinoj, kiel la miaj, tute perdadis la saĝon, kiam estis parolo pri kampo de batalo. Tiujn ĉi samajn reciprokajn kontraŭparolojn ni trovas ĉie. Oni devas aŭ ridi aŭ plori je tiuj ĉi ridindaj senkonsekvencoj; kaj mi plivolvas ridi je tio ĉi.“

Britain, kiu ĉiun apartan parolanton aŭskultis kun plej granda atento, ŝajnis subite veni al tiu ĉi sama opinio, se plej profunda ĉerka tono, kiun li eldonis, povis esti prenata por rido. Sed lia vizaĝo restis ĉe tio ĉi tiel senmova, ke, kvankam kelkaj el la gastoj matenmangaj sin turnis, ektimigite de la malagraba tono, tamen neniu supozis la farinton. Neniu, esceptinte la kunservantan Clemency Newcome, kiu per unu el siaj plej amataj membroj, la kubuto, donis al li puŝon kaj kun riproĉa murmureto demandis, je kio li ridas.

„Ne je Vi!“ diris Britain.

„Je kiu do?“

„Je la homaro“, diris Britain. „Jen estas la amuzajo.“

„En la vero, inter la sinjoro kaj tiuj ĉi advokatoj li fariĝas kun ĉiu tago pli malsaĝa!“ ekkriis Clemency kaj donis al li puŝon per la dua kubuto. „Ĉu Vi scias, kie Vi estas? Ĉu Vi volas esti forpelita?“

„Mi nenion scias“, diris Britain kun senesprima rigardo kaj senmova vizaĝo. Mi zorgas je nenio, mi kredas nenion, mi postulas nenion.“

Se tiu ĉi malgaja sinpriskribo, farita en atako de melankolio estis eĉ iom trograndigita, tamen Benjameno Britain — nomata iafaje Malgrand-Britain por diferenco de Grand-Britanujo (Great Britain), kiel oni diras Juna Anglujo por diferenco pli klare esprimi la Maljunan Anglujon — prezentis sian efektivan staton de l' animo pli bone, ol oni

povus pensi. Ĉar aŭskultante ĉiun tagon la sennombrajn parolojn, kiujn la doktoro turnadis al diversaj homoj kaj kiuj ĉiuj devis pruvi, ke eĉ lia ekzistado en la plej bona okazo estas nur eraro kaj sensencaĵo, la malfeliĉa Britain iom post iom venis en tian senfundaĵon de konfuzitaj kaj kontraŭparolaj ideoj, kiuj premis lin de ekstere kaj interne, ke la vero sur la fundo de sia putro en komparo kun Britain en la profundo de lia spirita mallumiĝo ŝajnis stari sur ebena tero. La sola, kion li klare vidis, estis tio, ke la nova elemento, kiun Snitchey kaj Craggs ordinare enportadis en tiujn ĉi interparolojn, faradis ilin nur pli nekompreneblaj, kaj por la doktoro ĝi ŝajnis ĉiam esti ia gajno kaj jesigo. Tial li rigardis la du advokatojn kiel kunkaŭzantojn de lia stato de l' animo kaj forte ilin malestimis.

„Sed kun tio ĉi ni nun havas nenion por fari, Alfred“, diris la doktoro. Ĉesante hodiaŭ esti mia zorgato kaj forlasante nin, provizita je tio, kion povis Vin instrui la latina lernejo tie ĉi kaj Via lernado en Londono kaj maljuna simpla vilaĝa doktoro, kiel mi, Vi nun eniras en la mondon. La unua parto de Via tempo de provado, kiun difinis Via mortinta patro, nun estas finita. Vi eliras nun, konforme je lia dua deziro, en la mondon en karaktero de propra sinjoro, kaj longe antaŭ finiĝo Via trijara restado en la medicinaj lernejoj de l' eksterlando, Vi nin forgesos. Dio! Vi forgesos nin en ses monatoj!“

„Se mi ĝin faros — sed Vi scias ĝin pli bone; kial mi bezonas disputi kun Vi?“ diris Alfred ridante.

„Mi scias nenion de tia speco“, respondis la doktoro. „Kion Vi pensas pri tio ĉi, Marion?“

Marion, ludante kun sia taso, ŝajnis diri — sed ŝi ĝin ne diris — ke ŝi nenion havas kontraŭ tio ke li ŝin forgesu, se li nur povas. Grace alpremis la florantan vizaĝon al ŝiaj vangoj kaj ridetis.

„Mi ne estis, mi esperas, tre maljusta administranto de la havo konfidita al mi“, parolis plu la doktoro; „sed en ĉiu okazo mi devas hodiaŭ forme esti liberigita kaj forigita de mia ofico; kaj jen estas niaj bonaj amikoj Snitchey kaj Craggs kun tuta sako plena je paperoj kaj kalkuloj kaj dokumentoj pri la havo, kiun mi devas transdoni al Vi (mi volus, ke ĝi estu pli granda, Alfred, sed Vi devas fariĝi granda homo kaj pligrandigi ĝin), kaj je alia malsaĝajo de tiu speco, kion oni devas subskribi, sigeli kaj transdoni.“

„Kaj leĝe atesti, kiel la leĝo ordonas“, diris Snitchey, forŝovante sian teleron kaj elprenante la paperojn, kiujn lia kolego eltenadis sur la tablo; „kaj ĉar mi kaj Craggs kune kun Vi, doktoro, estis kuratoroj de la havo, tial Viaj du servantoj servos al ni kiel atestantoj. Ĉu Vi scias legi, sinjorino Newcome?“

„Mi ne estas edzinigita, sinjoro“, diris Clemency.

„Ho, mi petas pardonon. Mi ĝin kredas“, diris Snitchey ridante, ĵetante rigardon sur la strangan figuron. „Vi scias legi?“

„Iom“, respondis Clemency.

„La formulon edzigan matene kaj vespere, ne vere?“ diris la advokato ŝercante.

„Ne“, diris Clemency. „Tro malfacile. Mi legas nur la fingringon.“

„La fingringon!“ ripetis Snitchey. „Kion ĝi signifas?“

Clemency jesis per la kapo kaj diris: „kaj la kribrilon de muskato.“

„Ŝi estas freneza! Ie por la lordo kanceliero!“ diris Snitchey kaj atente ŝin rigardis.

„Se ŝi havas ian proprajon“, aldonis Craggs.

Sed nun enmiksitis sin Grace kaj komprenigis al ili ke sur la ambaŭ parolataj objektoj sin trovas gravurita sentenco kaj ke ili tiel prezentas la poŝan bibliotekon de Clemency, kiu kun libroj ne multe sin okupas.



„Ha, tiel, fraŭlino Grace!“ diris Snithey. „Jes, jes. Ha, ha, ha! mi pensis, ke tiu ĉi bona knabino estas frencza. Ĝi tute tiel elrigardas“, li diris por si mem, balancante la kapon. „Kaj kio staras sur la fingringo, sinjorino Newcome?“

„Mi ne estas edzinigita, sinjoro“, rimarkis Clemency.

„Aŭ Newcome. Ĉu tiel estos bone?“ diris la advokato.

„Kio sin trovas sur la fingringo, Newcome?“

Kiel Clemency, antaŭ ol ŝi respondis tiun ĉi demandon, disŝovis unu poŝon kaj rigardis en ĝian senfundan profundon, serĉante la fingringon, kiu tie ne estis, kaj kiel ŝi tion ĉi saman faris kun la dua poŝo kaj ŝajnis trovi la fingringon profunde malsupre, kiel perlo de granda indo; kiel ŝi tiam forigis ĉiujn interkuŝantajn malhelpojn, konsistantajn el tuko de nazo, peceto da vaksa kandelo, ruĝvanga pomo, oranĝo, monereto de feliĉo, seruro, tondilo en ingo, plenmano da vitraj perloj, kelkaj buloj da fadeno, kudrilujo, plena kolekto de krispigiloj de haroj kaj unu biskvito, kaj ĉiun el tiuj ĉi objektoj aparte donis teni al Britain — tio ĉi nin malmulte interesas. Ankaŭ ne interesas nin, kiel ŝi, penante kapti kaj reteni la poŝon (ĉar tiu ĉi havis strangan inklinon saltadi kaj glitadi en angulon), okupis pozicion kaj trankvile sin tenis en ĝi, kvankam ĝi videble estis en plena kontraŭeco kun la homa anatomio kaj kun la leĝoj de la egalpezo. Estos sufiĉe, se ni diros, ke ŝi fine triumfe metis la fingringon sur la fingron kaj ekfrapis per la kribrilo de muskato, kaj ni devas rimarki, ke la literaturo de tiuj ĉi ambaŭ uzajoj sekve de tro muloa frotado estis proksima al forviŝiĝo.

„Tio ĉi do estas la fingringo?“ diris sinjoro Snithey, volante iom ŝerci je ŝia kalkulo. „Kaj kion diras la fingringo?“

„Ĝi diras“, respondis Clemency kaj malrapide kuncsilabis la surskribon: „For-ge-su-kaj-par-do-nu“.

Snithey kaj Craggs kore ridis. „Tio ĉi estas bela!“ diris Snithey. „Ne malbone!“ diris Craggs. „Montras tiom da konado de homoj“, diris Snithey. „Tiel uzebla por la praktika vivo“, diris Craggs.

„Kaj la kribrilo?“ daŭrigis demandi Snithey.

„La kribrilo diras“, respondis Clemency: „Ki-on-vi-vo-las-ke-la-ho-moj-al-vi-fa-ru-ti-on-ĉi-fa-ru-an-kaŭ-al-i-li“

„Faru ion al la homoj, por ke ili nenion al vi faru, Vi kredeble pensas?“ diris sinjoro Snithey.

„Mi ne komprenas“, respondis Clemency kaj balancis la kapon. „Mi ne estas advokato.“

„Mi timas, ke se Vi estus advokato“, diris sinjoro Snithey, rapide sin turnante al la doktoro, kiel volante antaŭe fari ion kontraŭ la impresoj, kiun tiu ĉi respondo eble povus elvoki, „Vi trovas, ke tio ĉi estas la regulo de vivado de la plej multaj de Viaj klientoj. En tio ĉi ili estas tre seriozaj — kiel ajn malsaĝa tiu ĉi mondo entute estas — kaj metas poste la kulpon sur nin. Ni, juristoj, efektive estas ne multe pli ol speguloj, sinjoro Alfred; sed pleje konsiliĝas kun ni koleremaj kaj malpacemaj homoj, kiuj elrigardas ne tute bone; kaj estas propre maljusto nin insulti, se ni montras al la homoj malafablajn vizaĝojn. Mi pensas“, diris sinjoro Snithey, „mi samtempe esprimas ankaŭ la opinion de nia sinjoro Craggs.“

„Sendube“, diris Craggs.

„Kaj tial, se sinjoro Britain volos oferi al ni iom da inko“, diris sinjoro Snithey, reprenante la paperojn ree en la manon, „ni kiel eble pli baldaŭ subskribu, sigelu kaj transdonu, ĉar alie venos la vojaĝa kaleŝo antaŭ ol ni scios, kie ni estas“.

Juĝante laŭ la eksterajo, estis tre kredeble, ke la kaleŝo preterveturos antaŭ ol sinjoro Britain scios, kie li estas; ĉar li staris tute enprofundigita en pensojn kaj reciproke pesadis en la kapo la argumentojn de la doktoro kontraŭ la argumentoj de la advokatoj kaj la argumentojn de la advokatoj kontraŭ la argumentoj de la doktoro kaj la argumentojn de la klientoj

kontraŭ la argumentoj de la ambaŭ kaj faris malfortajn provojn meti en konsenton la fingringon kaj la kribrilon (io tute nova por li) kun iu el la filozofoj konataj de li; per unu vorto li rompdis al si la kapon kiel la plej granda filozofo per teorioj kaj sistemoj. Sed Clemency, kiu estis lia bona genio — kvankam li havis nur tre malafablan opinion pri ŝia prudento, ĉar ŝi nur malofte zorgadis pri abstraktaj konsideradoj kaj ĉiam estis preta fari la ĝustajon en ĝusta tempo — dume venis kun la inko kaj ankoraŭ plu faris al li utilan servon per tio, ke ŝi per puŝo de la kubuto vekis lin el lia distreco kaj tute lin maldormigis.

Mi ne volas rakonti, kiel lin turmentis la timo, ofte renkontata ĉe homoj de lia stato, kiuj ne kutimis uzi la plumon — la timo, ke li ne povas subskribi per sia nomo dokumenton, skribitan ne de li mem, sen elmeti sin al ia ankoraŭ ne konata danĝero aŭ devontigi sin sen scio al pagado de grandegaj sumoj; mi ne rakontos, kiel li alproksimiĝis al la dokumentoj nur kun protestoj kaj devigita de la doktoro kaj necese volis ilin antaŭe trarigardi antaŭ ol li subskribis (la artifika karaktero de la skribao, neĵ parolante jam pri la juristaj esprimoj, estis por li kiel io ĥina) kaj turni la folion, por vidi, ĉu sur la dua paĝo ne estas skribita io danĝera; kaj kiel post la subskribo de sia nomo li fariĝis tute malfeliĉa, kiel iu kiu fordonis sian havon kaj siajn rajtojn. Mi ne povas ankaŭ rakonti detale, kiel la blua paperujo, kiu konservis lian subskribon, havis por li poste misteran altiran forton, tiel ke li ne povis ĝin forlasi. Mi ne rakontos ankaŭ, kiel Clemency Newcome, tute ekster si de rido ĉe la penso, ke ŝi estas persono grava, metis sin per siaj ambaŭ kubutoj super la tutan tablon kaj apogis la kapon sur la maldekstra brako, antaŭ ol ŝi komencis fari siajn kabalajn signojn, por kiuj ŝi bezonis tre multe da inko kaj kiujn ŝi samtempe per la lango pentradis en la aĉro. Kiam ŝi unu fojon gustumis inkon, ŝi fariĝis soifa je ĝi, kiel la tigro, kiu eklekis sangon, kaj ŝi volis subskribi ĉion eblan kaj meti sian nomon en ĉiuj anguloj. Por mallonge diri, la doktoro estis liberigita de sia ofico kaj de sia respondeco kaj Alfred prenis ĝin mem sur sin kaj komencis sian vojaĝon de l' vivo.

„Britain!“ diris la doktoro, „kuru al la pordo de l' ĝardeno kaj rigardu, ĉu la kaleŝo venas. La tempo forflugas, Alfred.“

„Jes, sinjoro, jes!“ vive rediris la junulo. „Kara Grace! unu sekundo! Marion — tiel juna kaj bela, tiel aminda kaj admirata, al mia koro tiel kara, kiel nenio en la mondo — ne forgesu tion ĉi! Mi metas Marion'on en viajn manojn.“

„Ŝi estis por mi ĉiam kara gardataĵo, Alfred. Nun ŝi estas por mi duoble kara. Mi montrós min inda je via konfido“, diris Grace.

„Mi kredas ĝin, Grace“, respondis Alfred. „Mi scias ĝin. Kiu povus rigardi en vian okulon kaj aŭdi vian sinceran voĉon kaj tion ĉi ne scii. Ha, bona Grace! se mi havus vian certan senton, vian trankvilan animon, kiel senzorge mi forlasus hodiaŭ tiun ĉi lokon!“

„Tiel vi pensas?“ rediris ŝi kun trankvila rideto.

„Kaj tamen, Grace — fratino mi preskaŭ dirus.“

„Diru ĝin!“ ŝi lin vive interrompis. „Mi aŭdas ĝin kun plezuro, neniam nomu min alie.“

„Tiel fratino“, diris Alfred, — „kaj tamen estas pli bone por Marion kaj por mi, se via sensanceliĝa kaj fidela animo nin tie ĉi subtenas kaj faras nin pli feliĉaj kaj pli bonaj. Eĉ se mi povus, mi ŝin ne pro mi forprenus.“

„La kaleŝo estas sur la altaĵo!“ ekkriis Britain.

„La tempo pasas, Alfred“, admonis la doktoro.

Marion staris flanke, kun okuloj mallevitaj; sed nun Alfred ame alkondukis ŝin al la fratino kaj metis ŝin al ŝia brusto.

(Daŭrigo venos.)

# Anoncoj.

## Nomaro

de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto,  
kiuj eliris ĝis Aprilo 1891.

№	Nomo de l' verko:	Kosto:
1.	D-ro Esperanto. Mejdunarodni Jazik. Predislovie i Polni Učebnik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa) . . .	15 kopekoj
2.	— Język Międzynarodowy. Przedmowa i Podrecznik Kompletny. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola) . . .	15 kop.
3.	— Langue Internationale. Préface et Manuel Complet. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca) . . .	20 kop.
4.	— Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana) . . .	20 kop.
5.	R. Geoghegan. Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla) . . .	20 kop.
6.	D-ro Esperanto. Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto (kun antaŭparolo) por Rusoj . . .	3 kop.
7.	— por Poloj . . .	3 kop.
8.	— por Francoj . . .	3 kop.
9.	— por Germanoj . . .	3 kop.
10.	— por Angloj . . .	3 kop.
11.	D-ro Esperanto. Dua Libro de l' Lingvo Internacia (verkita en la lingvo Esperanto) . . .	25 kop.
12.	D-ro Esperanto. Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia (en Esperanto) . . .	10 kop.
13.	Hanez. Safah achath lekulanu (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea) . . .	20 kop.
14.	A. Grabowski. La Neĝa Blovado. Rakonto de Puŝkin (en Esperanto) . . .	15 kop.
15.	L. Einstein. La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems. Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto . . .	50 kop.
16.	N. N. Rusa traduko de la „Dua Libro de l' Lingvo Internacia“ . . .	25 kop.
17.	D-ro Esperanto. Plena vortaro rusa-internacia . . .	1 rublo.
18.	N. N. Rusa traduko de la „Aldono al la Dua Libro“ . . .	10 kop.
19.	A. Grabowski. La Gefratoj. Komedio de Göthe (en Esperanto) . . .	15 kop.
20.	L. Einstein. Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Volapük und Lingvo Internacia . . .	25 kop.
21.	D-ro Esperanto. Meza vortaro internacia germana . . .	25 kop.
22.	Henry Phillips, Jr. An Attempt towards an International Language by Dr. Esperanto translated by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator . . .	50 kop.
23.	Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana . . .	20 kop.
24.	G. Henriclundquist. Dr. Esperanto's Internationelt Sprak (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda) . . .	20 kop.
25.	A. Demonget. Internacia ou Volapük? par Léopold Einstein, traduction de Auguste Demonget . . .	25 kop.
26.	E. de Wahl. Vortaro Esperanto-hispana . . .	3 kop.
27.	G. Henriclundquist. Vortaro Esperanto sveda . . .	3 kop.

28.	Klubo Nurnberga. La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberger Weltsprache-Verein . . .	25 kop.
29.	R. Libek. Starptautiska Valoda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva) (Lettisch) . . .	60 kop.
30.	Kolekto da novaj verkoj (en Esperanto), kajero No. 1 . . .	25 kop.
31.	Adresaro de la Esperantistoj, kajero No. 1 . . .	10 kop.
32.	Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-ru-mana . . .	3 kop.
33.	Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana) . . .	25 kop.
34.	M. S. Bogdanov. Pulen učebnik za svetski ut jezik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara) . . .	50 kop.
35.	Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala) . . .	25 kop.
36.	J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana) . . .	20 kop.
37.	A. Grabowski. Kondukanto internacia de l' interparolado kun modeloj de leteroj (en Esperanto) . . .	30 kop.
38.	A. Zinovjev. Mejdunarodni jazik „Esperanto“ (la tuta eldono estis senpage dissendita) . . .	
39.	Fr. Vl. Lorenc. Uplna učebnice mezinarodni reči dra. Esperanta (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bohema) . . .	25 kop.
40.	D. Gurevič. Sefer hamilim Esperantis (Vortareto hebrea-esperanta) . . .	20 kop.
41.	L. Zamenhof. Vsemirni jazik Esperanto. Polni učebnik s 2 slovarjami (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj) . . .	10 kop.
42.	Ludwig Meier. La Lingvo Internacia Esperanto. Vollständige methodische Grammatik, Formenlehre und Syntax der internationalen Sprache Esperanto . . .	60 kop.
43.	Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch-internationaler Teil. Meza vortaro germana-internacia . . .	25 kop.
44.	V. V. de Majnov. Renaskita Manfred, dramo en tri aktoj, de K. R. . . .	25 kop.
45.	A. Grabowski. La Nova Joro, de Boleslaw Prus. Janko Muzikanto, de H. Sienkiewicz . . .	20 kop.
46.	A. Dombrovski. Lingvo internacia de Dro Esperanto, eldono litova. Mokintuve torp-tautiskos kalbos Dro Esperanto . . .	15 kop.

## Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache.

Deutsch-international.

Meza vortaro germana internacia povas esti ricevata de la presejo de **W. Tümmel, Nürnberg.**

... Kosto 50 pfenigoj. ...